



Informoj:  
Arto :- Literaturo  
Turismo :- Sciigoj

# NIA VIVO

Administracio  
kaj Redakcio:  
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

## EKSTERLANDAJ PAĜOJ

### "FLORKRONO"

(Sur la tombo de Sro. Izidoro Floría)

Stulta kuglo trabatis la koron,  
Kiu tiel aspiris al bel',  
Pleniginte animan amforon  
Per laboro kaj nobla akcel'.

Se en sango sin kaptis aŭro,  
Pli solene ekbrilos la sun',  
Ĉar hardite ĝi iros al gloro  
Kun mistera kaj sankta imun'.

¡Nia Vivo! dirinte fiere,  
Ne eraris obstina talent',  
Ĉar mortinte, li vivas surtere  
En la flor' de l' espero kaj sent'.

Nia Vivo kun sia anaro  
Estas li, kiu iras al cel'  
Tra malfid', malkuraĝo kaj baro  
Ĝiam rekte, antaŭen al bel'!!

VSEVOLOD LIBERT.

Crimea (Sovetunio).

## GRAMATIKA TEMO

En kelkaj rekomendindaj kaj tre didaktikaj esperantaj gramatikoj, mi trovis ion konfuzigan, kio tute ne plaĉis al mi.

Tia rimarkita konfuzajo estas malkonsento inter diversaj aŭtoroj kiam ili verkas prepozician tabelon, ĉar jen unuj konsideras adverboj nediskuteblajn prepoziciojn, jen aliaj konsideras ilin konjunkcioj. Vidu du klarigantajn ekzemplojn. In lernolibro montras la sekvantajn radikojn kiel adverbojn: *Anstataŭ, laŭ, krom*; alia lernolibro kredigas ke; *anstataŭ, malgraŭ*, estas konjunkcioj.

Sendube en la unua momento oni pensos, ke tia miksaĵo ne malhelpas al la taŭga studado kaj uzado de la amata lingvo nia kara Esperanto; sed se oni meditas iomete kaj spertas kun lernantoj konantaj kelkajn gramatikajn aferojn, oni feliĉe ricevos kontraŭan opinion, t. e., la gravecon de unika prepoziciteblo akceptita de ĉiuj lingvistoj.

Rapide mi penos pravigi mian aserton en tiu ĉi modesta artikolo.

Ĉiuj esperantistoj scias perfekte la formadon de la kazoj kaj la simplan mekanismon de nia brilanta kaj diafana deklinacio.

Ĉe aliaj naciaj lingvoj vivantaj aŭ mortintaj troviĝas senlima nombro da malfeliĉaĵoj kaj baroj por dece deklinacii; kiel okazas en la harmonia lingvo Cervantesa, kie ni determinas la kazojn per multaj rimedoj: jen per ŝanĝo de la vortoj (pronomoj), jen per prepozicioj, jen per la kunteksto, jen per akordiĝo, jen per ordloko de subjekto.

Aŭskultu nian Zamenhofan rimedaron por distingi la kazojn: Esperanto estas en nominativo deklinacieblaj vortoj sen prepozicio nek finiĝo N; en akuzativo tiuj, kiuj ne havas prepozicion, sed finiĝon N; en dativo vortoj kiujn senpere antaŭiras la vortetoj *al* aŭ *por*; en genitivo tiuj sekvantaj vorteton *de*. Fine en ablativo estas vortoj skribitaj post cetera prepozicio, aŭ post vorteton *al, por, de* kun signifo ablativa; ankaŭ vortoj kun antaŭmetita prepozicio kaj N; ankaŭ vortoj kun N, kiu anstataŭas iun ajn prepozicion.

Kaj nun afabla leganto, vi komprenos senpere ke supozante la adverbon «almenaŭ» prepozicio, oni trovas nekorekta tiun ĉi frazon: «Almenaŭ li venis». Kial? Tre klare! Li estas nominative, tial antaŭ ĝi devas ekzisti *nenia* prepozicio.

Sekvas same kaj reciproke, ke akceptante la supremontritajn opiniojn ni uzas sen timo la prepoziciojn: «anstataŭ mi parolas», «krom mia amiko manĝas», «malgraŭ ŝi kantas», kaj post tiaj esperantaj esprimaĵoj ni restos kontente kun la konscienco trankvila nur post monstro de ilia nekoretoco.

Mi kuraĝas konsili al la gesamideanoj ke ili instruu zorge, pripense kaj malripedeme la prepozician, atentigante kaj observigante starantajn diferencojn inter proksimaj formoj de la gramatika familio, kaj ni ne forgesu ke la certaj kaj sendisputaj esperantaj prepozicioj estas 32 montritaj en la bonmerita verko de Ingla kaj López Villanueva — José López Ros.

Jaén.

Pri tiu grava temo, nia kara kunlaboranto, S-ro Ingla, verkis artikolon, kiu aperos en la venonta numero de NIA VIVO.



## «TRA LA MONTJOJ»

### ADIAŬA NAJTINGALA KANTO

Mortas la somero, finiĝas la utila tempo en la eleganta sanigejo kaj komencas frosti la noktoj en la altaj montoj.

La malgajulino kaj ŝia bona amiko rigardadas tra la balkonego de la kazino la lunan lumon sur la lago kaj aŭdegas la bruon de la arbaro, kiu ŝajnas plori pro la krueleco de la vento. Sur ĉi tiu bruo, kaj la malproksimaj bruetoj de la akvofaloj, oni aŭdas la kanton de najtingalo. Tiu ĉi nokton ĝia kanto havas novan sonon, ĉni sonas eĉ tragedie inter la ploroj de la vento.

—Malgaja najtingalo. Jam estas tro malvarma la aŭtono por ĝi!—Ekdiras la malgajulino kaj pensas ke ankaŭ en ŝia koro jam de longe reĝas malvarmo. Ŝia bona amiko, kiel se kun li mem parolus, respondas al la frazoj:

—Tiu ĉi kanto de la najtingalo estas kiel ĝia adiaŭo. Adiaŭ al la somertempo, al ĉi tiuj belaj montoj kaj al ni, geamantoj de la poezio, kiuj aŭdis ĝiajn kantojn. Jam reĝas malvarmo kaj ĉiuj najtingaloj foriras. Hodiaŭ estas la lasta nokto ke mi restos ĉi tie. Ankaŭ estas malvarma la vetero por mi, malgaja arta najtingalo! Morgaŭ mi foriros. Ankaŭ la najtingalo foriros kaldaŭ por serĉi alian pli varma klimaton. Jam komenciĝos aŭtuno, heroldo de la vintro. Sed ne forgesu, kara amikino! Post la aŭtuno malgaja kaj la kruela vintro alvenos printempo revivigonta ĉi tiujn belajojn kiujn ni vidis morti, kaj denove ni kuniĝos, najtingaloj kaj geamantoj de ĝia rava kanto, per la voko de nova somero.

—La lasta nokto—Malgajulino ŝajnas aŭdi nur tiun frazon: La lasta nokto. Kaj pensas kio estis por ŝi tiu ĉi *Arta najtingalo*, kiel li mem nomas ŝian amikon. Li eble ne scias ke multajn fojojn dum la somero per unu frazo aŭ nur rigardado, reviviĝis en ŝia koro io de la perdita feo en la vivo. Estis ŝia konsolo, ŝia sola amiko, sed nun... La lasta nokto! Morgaŭ ŝi jam ne aŭdos lian varman vokon donante konsolon, nek la rava arto de lia violonĉelo ravis ŝin per ĝia preskaŭ homa voko de senkonsola doloro.

Tiel, kiam poste oni aŭdas la melodion de «Dia animo» kie la violonĉelo ploras la kanton, ŝi pensas, ke ne estas la violonĉelo sed la voko de ŝia amiko kiu ploras pli ol kantas la frazojn:—Vojiri mi devas ĉiam vaganta, sen atingi hejmon en mia vojo. Birdo perdita, neniam mi atingos varman neston por kanti.

La malgajulino premas ŝiajn manojn en gesto de muta doloro. Kion ŝi povas fari por konsoli al ŝia bona amiko? Nenion. Ŝi estas malgranda antaŭ lia doloro sed murmuretas ŝi mem.

—Ne, mia bona amiko, neniam vi estos por mi kiel *Birdo sen nesto*, malgaja majtingalo de la arto. Se la vento de la doloro rompis vian neston, ne timu, ne ploru. Kantu, kantu ĉiam. Per via canto konsolu aliajn animojn kaj ne forgesu, ankaŭ vi, ke post la malgaja vintro alvenos alia printempo kaj en tiu eble vi povos fari denove alian neston, pli fortan, pli altan por ke nenio kaj neniu povu detrui ĝin. Dum tio alvenos... kantu, kantu ĉiam, arta majtingalo, kantante vi konsolas alian animojn kaj disdoni konsolojn estas forgesi niajn proprajn dolorojn.

PILAR TRAMULLAS.

Jaca.

## PESIMISMO NE DEVAS ESTI

Rigardante nune la homaron, la plej terura eskeptikismo ŝajnas invadi nin.

Parolu kun skeptikulo kaj malfacile vi sukcesos lin silentigi. Ĉiuj argumentoj estas responditaj de skeptikulo, kiu fiere asertas, ke la homo estas lupu por la homo, ke ĉio en la mondo estas mensogo, ke nenie oni trovas sincerecon, ke ĉio malsukcesis krom la besto, kiu vivas interne de la homo atendente la ĝustan momenton por montri ke ĝi ne estas forigita, ke ĉiam ĝi vivas kaj estas preta profiti la okazon por pruvi ĝian regpovon.

Por skeptikulo, ŝancelas la fundamentoj de la homaro, kiu ĉion fidis al la ĉiopova oro. Li opinias ke la religio jam perdis la tutan forton tial, ke dum multaj jarcentoj oni predikis la pacon kaj responde al tio, la homaro okazigis la plej teruran militon ĝis nun konatan, piedpremane kiel ĉifonon la maksimumon *ne mortigu*.

Politiko kaj ekonomio estas ankaŭ ridindaĵoj. Vortoj, nur vortoj, sen ia potenco.

Kun triumfa sinteno la skeptikulo prezentas la spektaklon de la socia batalon, kies diversaj formoj simpliĝis je nur du malamikoj, nome, kapitalismo en unu parto kaj laborismo en alia. Du faktoj, kiuj batalas por submetigi unu la alian. Tamen la oro estas la sola reganto de la mondo kaj ĉiuj devas obei aŭ resti flanke de la socio kvazaŭ netaŭgajo.

De ĉie eltiras ekzemplon la skeptikulo por pruvi ke mensogo kaj hipokriteco alvenas en la plej altajn kaj malaltajn rangojn.

Tamen, pesimismon ni devas forigi. Politiko, ekonomio kaj religio deklaris fakte sian nekaponblon, sed nova sistemo anstataŭos ilin. La homaro progresas ne nur intelekte, sed ankaŭ morale kaj el la ruino de unu epoko eliras alia malpli neperfekta por fali poste kaj lasi liberan vojon al novaj vivformoj. Malaperis paganismo, ankaŭ la antikvaj imperioj sed la homo ne pereis. Nur la organizformo aliformiĝis. Ifoje la ŝanĝo ŝajnas de-



generi en haoso, sed meze de tiu malordo, intelekto trovas rimedon por denove envojigi la homan aktivecon.

Oni devas timi kvankam ŝancelu aŭ falu malnovaj institucioj. Tio estas krizo, kiu similas knabon elirantan el sia infaneco por eniri en plej difinitan homnaturon.

Ni travivas gravajn momentojn de la homara historio neniam konataj ĝis nun, kun speciala karaktero, ĉar oni ne minacas faligi tiun aŭ alian poliksistemon. La fundamento de la nuna sociordo estas atakata por ĉion renversi kaj la homaro nepre sekvas sian trajektorion, same kiel ŝtono ĵetita ne iras returnen, sed daŭrigas antaŭen ĝis kiam la forto ĵetinta perdis sian energion. La homaro ne estas ŝtono sed vivantaĵo kiu haltos momente por organizi vivsistemon profitante la sperton eltiritan per studo pri estintaj generacioj.

Zaragoza.

EMILIO ARTIGAS.

## MALNOVAJ PAĜOJ

### EL LA LIBRO DE MIAJ FABLOJ

En Egiptujo, en tempoj de teĉaj Faraonoj, ia transveturanta juna fakiro aranĝis al la loĝantoj amuzadon... En valo, pli belega ol la valoj de Eŭfrato, li faris per ia sorĉo lagon, plenan da larmoj de mizeruloj kaj malliberuloj, da larmoj de maljunuloj kaj infanoj, da larmoj de vidvinoj kaj orfoj... Kaj, pleniginte tiun ĉi lagon ĝis la bordoj, la fakiro restigis ĝin por mirigo de saĝuloj...

Sur tiu ĉi lago, ĉe brilo de luno, ĉe sonoj de harpoj kaj lumo de multkoloroj fajroj, en ĉiu festo la ŝipetoj de Faraonoj naĝados kiel blankaj cignoj... La ĥoroj de najtingaloj, disĝemataj per ameca kanto, trapleniĝadis per sonetoj la aeron, plenan da bonodoro kaj varmeto... Malsobrigitaj per sorĉo de belegaj noktoj, la kapoj de l' egiptanoj alkliniĝadis al la revoj pri la superteraj landoj de beleco kaj poezio, de feliĉo kaj volupto... La luksaj ŝipetoj naĝadis trankvile kaj majeste sur la vitra maso, sur la bruetanta kaj murmuranta kristala ondo, tiel mallauĉa, kiel respiro de mizerulo, kiel tombo de homa feliĉo.

Tie kaj ie la mano de petolanta infano ĵetadis en tiun ĉi akvon belegajn rozojn; la rozoj tuj paliĝadis. Kiam iu trempadis okaze la randon de sia multekosta vesto en la lagon — sur la vesto restadis makulo... Virino, varmigita per narkotikoj de ĉirkaŭprenoj, volis estingi la soifon de la flamanta buŝo per la fluidaĵo de l' lago, sed vane...

Tio ĉi fine ekkolerigis la Faraonojn, incitis la homojn, kiuj deziris malsobron. Oni alvokis alian maljuna fakiron, por ke li elsekigu la sorĉan lagon.

«Ekzistas nur unu rimedo necerta.—diris li, klinkante humile la kapon, oni povas elsekigi la lagon sole per oro!»

Kaj alvenadis multehavantaj riĉuloj kaj ĉiu ĵetadis en la lagon pecon da oro...

Kaj alvenadis pli malriĉaj kaj du aŭ tri el ili kolektadis unu moneron...

La lago restis.

Tiam el la tuta Egiptujo oni alvokis amasojn da popolo kaj ĉiu, kiu povis, ĵetadis oron en la lagon.

Sed la larma lago ne sekiĝadis.

Kontraŭe. Ju pli da oro oni ĵetadis en ĝin, des pli leviĝadis la nivelo de l' lago, ĝis fine la akvo eliris super la bordoj, superversante la valojn de la tuta Egiptujo.

Kaj de malproksimo rigardis tion la sfinkso, ŝtona, malvarma kaj senmova. Kvankam ĝi ĉiam estis silentanta kaj plena da enigmo,—nun tamen ĝi diris:

«La elversitajn larmojn neniu viŝos neniam!»...

Tiun ĉi fablon nuntempaj homoj tradukis en siajn lingvojn kaj—strange ĉiuj donis al ĝi la saman titolon: filantropio.

Mirinde!...

JOZEF WASNIEWSKI

Eltirita el «Lingvo Internacia», n-ro 1<sup>a</sup>, januaro 1895.

En la lasta 31<sup>a</sup> aŭgusto okazis la datraveno de la kruela morto de nia neforgesebla iniciatinto S-ro Floria.

Dum tiu tago oni efektivigis mesojn favore al lia animo, al kiuj ĉeestis kelkaj Fratecanoj.

Ripozu li pace!

## SCIIGOJ

La Hispana Ligo de Esperantaj Fervojistoj oficdonis delegito en Zaragoza al nia komitatano S-ro Puértolas al kiu ni tutkore gratulas pro tiu oficdono.

\* \* \*

Por plenumado de la 3<sup>a</sup> artikolo de la Regularo de «H. E. K.», la duan oktobro, je la 11<sup>a</sup> matene, okazos la jarkunveno de Delegitoj ĉe la socia ejo, Stro Roda, 14-16.

## ĈE SORĈISTINOJ

(Daŭrigo)

Ian malvarmegan vintran nokton envolvis min hajla uragano proksime de la malbenita budo. Mi ne bezonas diri kun kia plezuro ili ricevis min, kaj per kia sincera korinklino ili regalas min; Rosiña sekigis min per drapo; Calixta enjetis en fajron manplenojn da stipoj stelitaj al la mastro de la proksimaj montoj.



La maljunulino okupiĝis remburi je misteraj objektoj drapsaketojn kudritaj de patrino kaj filino.

Ili ne sin kaŝis antaŭ mi por daŭrigi sian laboradon; en ĉiu saketo metis mia sorĉistino tri ajlojn, tomban teron, rutan branĉeton, tr laŭrajn foliojn kaj olivajn foliojn de Palmodimanĉo, unu denton de mortinto kaj sep vaksajn gutojn, de kandelo de la monumento de Sankta Semajno; mi ne rememoras ĉu ion pli.

—Sed mastrino Nemesia, se vi scias, ke ĉio tio estas mensogo, por kio vi trompas la genton tiamaniere?

—Hel... kion vi volas, sinjoro, la gento ilin demandas al mi; ĝi ilin pagas al mi., kaj mi vivadas.

Tiu conversacio klarigis al mi, ke mastrino Nemesia ne vendis siajn amuletojn al ĉiuj, kiuj demandis al ŝi, sed nur al tiuj, kiujn ŝi volis defendi kaj garantii kontraŭ la malfeliĉeco. Se malgraŭ la magia talismano iu, kiu surportis ĝin, infano aŭ knabino, malsaniĝis kaj mortis, ŝi diris, ke tio ne estis ensorĉa *malbono*, sed malsano de *kuracisto*; la fido pri la amuleto certigis kontraŭ la hipnota ensorĉaĵo, per hipnoto.

Kaj la malbonaj gentoj (laŭ la sorĉistino), la gentoj pli kredemaj kaj ignorantaj estis la plej sendefendaj al la ensorĉa petego, pro ilia propra kredemo kaj ignoro.

\* \* \*

Mi jam alvenas al la fino, al la fino de mia maljuna sorĉistino.

La tuta ĵus pasinta generacio konis pastron tre ruzan, tre senhontan, kelkajn fojojn admonitan de la episkopo de Mondoñedo; li ŝajniĝis mistiko kaj sin dediĉis al la samaj artoj de mastrino Nemesia, nur alimaniere, sen saketoj amuletoj; li laboradis laŭ la skolo de S. Petro Martiro, per ekzorcoj.

Mi ne citas lian nomon, ĉar liaj parencoj vivas, tre estimindaj personoj, kiujn ni ĉiuj konis.

Tia pastro vidis en ĉia malsanulo *demonkaptiton*... kvankam li vokis min, kiam li malsaniĝis.

Kaj tiu pastro, mortigis mastrinon Nemesian; li starigis preĝejeton por libere labori kaj li konstruis ĝin ekster la paroĥlando por eviti la aŭtoritaton de la paroĥestro, kiu malpermesis al li tiun nemoralan negocon, tiun montrompon, pli granda, ol tiu de la maljunulino, pro centoj da kaŭzoj.

La gento ekalkuris al «D. José», kaj forlasis mastrinon Nemesian, precipe la urbagento kaj eĉ tiu de tre malproksimaj vilaĝoj kaj nia maljunulino mortigis pro malespero, eljetante malbenojn kontraŭ sia kolego kaj konkuranto.

Kiam oni alportis al ĝi la komunion, la vilaĝaj virinoj mirigitaj, demandis sin:

—Kial oni alportas al ŝi Kriston en Eukaristio, se ŝi estas sorĉistino?

—Eble ŝi ne estas tia, respondis alia.

—Aŭ abomenis de la diablo kaj revenis al Dio, argumentis alia.

Eliris la Eukaristio, kiam mi malsupreniris la deklivon kaj eniris, mia maljunulino mortigis tre rapide. Vane, mi penis por revivigi tiun koron; vane, mi sendis Rosiña'n por serĉi ĉe mi botelon da konjako, tiun universalan kuracilon, tiun ĉielan likvoron; ankoraŭ ŝi prenis kelkajn pokaletojn, kiuj, ebligis komenci la vedan himnon de siaj benoj, sed tiun ĉi fojon la himno estis mallonga, ĝi havis malmultajn versojn, ĉar la spiro estis malmulta; jam ne taŭgis la metodo Jacoud.

\* \* \*

Mia sorĉistino jam mortis kaj por ke oni alportu ŝin al la tombejo la vilaĝestro altrudis al kvar najbaroj; oni enterigis sin malproksime de la ceteraj tomboj, antaŭ la pordo de la ruina ogiva preĝejo, tre proksime de kie dormas antaŭ kvar jarcentoj, la nobelo Alfonso de Serantes, kies tombejon konas malmultaj Ferrolanoj.

Kredeble, la sola persono, kiu kompatis kaj konsolis ŝin je ŝia vivado, estis mi.

\* \* \*

Post malmultaj monatoj mi trovis Rosiñan, kombitan, purigitan, pli bone vestitan.

Al miaj demandoj ŝi respondis, ke ŝi foriros al Anglujo por servi anglan sinjoron, mastron de ŝipo, kiun oni riparigas antaŭ kelkaj monatoj en haveno.

—Kaj vi ne timas foriri tiel malproksimen, Rosiña?

—Ne s-ro; multajn fojojn diris al mi mia avino; ĉiam estas mia sorto: «Mara viro kun estantaj garantiaĵoj». Mia avino diris al mi: «Neniun amu de tiu ĉi lando; vi atendu viran maron de tre malproksima lando». Kaj nun, li alvenis, kaj mi foriras; certa fakto, ne povus malsukcesi.

Mirigis min tiu superstiĉa fatalismo; mi pensis pri Lady Hamilton, pri Enma Harte, servistino de vilaĝa drinkejo de Chester, vartistino poste en Halifax, kiu estis la plej bela virino el Anglujo, la preferata de la Neapola reĝino kaj patrino de filino de la senmorta Nelson.

Mi demandis al mi men, ĉu Rosiña faris bone aŭ malbone kovrante ŝian karnon per silko, manĝante fazanon kaj trufojn anstataŭ maizan panon kaj trinkante ĉampanon anstataŭ trinki la kristalan akvon de Chamorro.

—Adiaŭ!, Rosiña, ke vi estu feliĉa.

—Dio faru al vi bonon.

SANTIAGO DE LA IGLESIA.

Ferrol, 31<sup>a</sup> Decembro 1.919.

Tradukis el la hispana lingvo

EMILIO BRUQUETAS.